Zoologia Nomenklaturo- fariĝis fidelaj al la NBN kaj ties nomigaj principoj dum daŭro de la pasintaj 25 jaroj de ĝia ekzisto. Sed oni ne pretervidu, ke novaj sistemoj eble enhavas aliajn, sed same nedezireblajn malavantaĝojn proprasisteme, kaj ni revenu al la komenca demando: ĉu estas por vi *Antropo regnotipa* aŭ *Homo sapiens* ?

Bibliografio

*de Smet, W.M.A.* (1991). *A guide to the New Biological Nomenclature (NBN).* Eldonita de la Asocio por Enkonduko de Nova Biologia Nomenklaturo (NBN), *Kalmthout,* Belgio

*de Smet, W.M.A.* (1995). Nuna stato kaj perspektivoj de Nova Biologia Nomenklaturo. En: *Chrdle, P. (ed.)*: La stato kaj estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto, *Kava-Pech*-eldonejo, *Dobrichovice (Praha)*, p. 139-154

*Groombridge, B.* (1992)(ed.): *Global biodiversity : status of the Earth's living resources. World Conservation Monitoring Centre, Chapman & Hall, London.*

*Sachs, R.* (1996). Zoologia nomenklaturo, medicina terminaro kaj Internacia Lingvo. Scienca Revuo 47 (1), 14-26

*Støp-Bowitz, C.* (1994). Zoologia kaj botanika nomenklaturo (propono pri regularo). Eldonita de Terminografia Komisiono pri botaniko kaj zoologio (*TEC-Nor-CSB*), Universala Esperanto-Asocio (TEC), *Rotterdam.*

*Systematics Agenda* 2000 (1994). *A global initiative to discover, describe and classify the world's species. Technical Report of American Society of Plant Taxonomists, Society of Systematic Biologists and the Willi Hennig Society, p.16*

Adresoj de la aŭtoroj

*Neil CUMBERLIDGE, Ph.D.*
*Professor of Zoology,*
*Department of Biology*
*Northern Michigan University*
*Marquette, Mi 49855, USA*

*Prof. Dr. Rüdiger SACHS*
*Ernst-Metz-Strasse 3*
*D - 37269 - Eschwege*
*Deutschland*

Priaŭtoraj informoj:

Profesoro Cumberlidge laboras pri taksonomio, sistematiko kaj evolua biologio de riveraj kraboj, speciale en Afriko kaj Madagaskaro, kaj priskribis kelkajn novajn speciojn kaj genrojn de tiaj nesalakvaj kraboj.

Profesoro Sachs okupiĝas pri medicina parazitologio, kaj malkovris kaj priskribis kelkajn novajn parazitospeciojn dum esplorlaboroj en Orientafriko.

Kadre de esplorprojekto pri homa paragonimozo en Okcidenta Afriko, la aŭtoroj 1988/89 esploris detale la krustacean faŭnon en Liberio. Dum 10-monata kunlaboro ili malkovris 3 novajn kaj re-malkovris 2 aliajn, tre maloftajn krabospeciojn. Identiga scienca kaj taksonomia enordigo de la kraboj estis speciale gravaj, ĉar kelkaj el ili rolis kiel portantoj de homaj infektiĝoj per pulmaj distomoj, kaŭzantaj paragonimozon.

Scienca Revuo 48 (1997) 19-28

# Pri la estetiko de la beletra verko: Aktualaj kontraŭdiroj (Parto I)*

*Ignat Florian BOCIORT (RO)*
Universitato de *Timişoara,* Rumanio

Resumo

Gravaj demandoj de la estetiko ricevas, kaj en traktaĵoj kaj en literatura kritiko aŭ en la diskutoj de la literatoj, kontraŭdirajn respondojn: Ĉu la artverko estas perceptebla kiel sistemo, kun komponantoj kaj internaj rilatoj aŭ nur kiel tutaĵo? Ĉu la literatura kritiko disponas pri objektivaj kriterioj por aprecadi la beletrajn verkojn aŭ ĉio restas al la subjektiva gusto de la kritikisto? Kio estas *valoro* de la artverko? Ĉu ekzistas principoj en la kreado de la artverkoj aŭ ĉu la poetoj, prozistoj kaj aŭtoroj de teatraĵoj "kantas" nur instinkte? Ĉu la estetiko estas nur spekulado ĉirkaŭ la beletraĵoj aŭ ĉu ĝi povas havi praktikajn signifojn?

La aŭtoro analizas la problemarojn el vidpunktoj de la sistemteorio, de la teorioj pri strategiaj ludoj (sen matematikaj metodoj) kaj de la modelteorio, kaj montras la erarojn de la tezoj, kiuj neas la sistemecon de la artverko aŭ neas ĉiun ajn principon en la kreado. *La valoro* estas komplekso de solvoj unue sur abstrakta modelo de la historie evoluanta beletro. *Estetikon oni devas kompreni kiel teorion, metodologie fundamentitan, pri la efika agado en la kreado kaj en la aprecado de la artverkoj.*

Enkonduko

Tiu artikolo estas eltiraĵo el prelego mia farita en julio 1996 en la kadro de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) dum la 81a Universala Kon-

-------------------------------

* Dediĉe al elstara sciencisto prof. d-ro *Carl STØP-BOWITZ* kun respektplena omaĝo pro liaj dumjardekaj gravaj kontribuoj al la progreso de Esperanto.

greso de Esperanto (UK) en Prago, Ĉeĥio, kaj resumo de seshora samtitola studkurso por studentoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, kiu okazis en la sama tempo dum kaj post la Praga UK. Pro sia duobla funkcio, nome celante al fakuloj kaj nefakuloj, al studentoj kaj neakademianoj -kaj nun ankaŭ al la diversfakaj legantoj de *Scienca Revuo*- tiu ĉi ekstrakto devas preni iom da metodologia kaj didaktika orientiĝo. Jen ĝiaj ĉefaj ideoj: 1) Du komencaj mencioj; 2) Pri kia beletro temas?; 3) Esencaj kontraŭdiraj demandoj de la beletra estetiko; 4) Funkciaj komponantoj de la beletra verko; 5) Abstraktaj modeloj en la beletra fenomeno; kaj 6) Funkcioj de la beletro; valoro de la beletraĵo.

## I. Du komencaj mencioj

En sia prelego dum la 27a UK en Romo (en la jaro 1935) *Gaston WARINGHIEN* emfazis, ke la literaturajn aranĝojn de la Universalaj Kongresoj de Universala Esperanto Asocio (UEA) ĉeestas la elito de la kongresanoj. Li taksis kiel "danĝerplenan honoron prelegi antaŭ tia publiko". Nu, tiu honoro estas por mi pli danĝera: la Rumana movado estis preskaŭ sesdek jarojn malpermesita, kio malfavoris kaj nian lingvan perfektiĝon kaj aliron al Esperanta bibliografio. Feliĉe mi tamen sukcesis havigi al mi por tiu ĉi semajnaj prelegoj kelkajn teoriajn kontribuojn de *KALOCSAY, WARINGHIEN, AULD, RAGNARSSON, PIRON, SILFER* kaj aliaj.

Konforme al la titolo de la prelego, mi ne faros priskriban estetikon; pri ĝenroj, specoj, formoj kaj teknikoj de la beletro oni povas informiĝi en bonaj laboraĵoj pri literaturteorio. Mi celas nur pli da klareco en la perceptado de kelkaj gravaj demandoj de la *beletra teorio*, kiuj kutime en la tradicia estetiko ricevas repondojn vagajn, taŭtologiajn kaj kontraŭdirajn. (*Diskuttemo en AIS-seminario:* La konceptoj pri metodologio kaj taŭtologio)

## II. Pri kia beletro temas?

Estus senefike prezenti al vi ĝeneralaĵojn pri diversaj skoloj aŭ tendencoj en la nuntempa beletro. Mi elektis por la Esperantistaro beletran koncepton kiu, miaopinie, plej bone povus helpi plifortigon de la movado kaj pliriĉigon de ĝia kulturo. Tiu koncepto estas *klasika moderneco*.

*Baldur RAGNARSSON*, en siaj prelegoj "La poezia arto" ne uzas la menciitan koncepton, sed, se mi bone komprenis lin, niaj konceptoj pri la hodiaŭa necesa Esperanta beletro samas aŭ similas. *Klasikeco* signifas tie ĉi "kreaĵon esencan kaj daŭrindan"; *moderneco* signifas "kreaĵon lernintan el novaj (sed ne ekstravagancaj) spertoj". Videble, temas pri strategiaj perceptoj de la du nocioj, kiuj paralelas en racie elpensitaj kulturaĵoj. Ekzemplo por tio estas la granda kverelado inter la "antikvuloj" kaj "modernuloj" en la Franca literaturo de la 17a jarcento. En nia beletro, *KALOCSAY* kaj *WARINGHIEN* emis al klasikeco, dum la posta generacio pli atentis al validaj modernaj atingaĵoj. Elstara, sed ne sola, ekzemplo de la dubraka neceso estas "La infana raso" de *William AULD*.



En miaj prelegoj mi prezentos argumentojn por tiu saĝa direkto samtempe ege malnova kaj ege aktuala; malnova, ĉar propra al ora epoko de Periklo en antikva Ateno; Tucidido (460 - 395 a. K.) citas, inter aliaj, memorindan argumenton, per kiu Periklo montras la superecon de Atenianoj kompare al iliaj malamikoj: "Ni amas la arton simplan kaj altnivelan kaj la kulturon kiu ne moligas la animojn".[1]

Esperanto faras el la racieco de la kulturo, el la intelekta kaj afekcia konvinkofortoj de la beletro, ilojn por alporti iom da nova lumo al la nuntempa konfuzita homaro. Ni firme tenu tiun vojon de la beletro "simpla kaj altnivela", nutrado por menso kaj koro! Nia ŝipo ne sin turnu laŭ ĉiu efemera venteto, sed ankaŭ ne restu al arĥaikaj veloj. (*Didaktika orientiĝo:* i) Historiaj sencoj de klasikeco kaj moderneco; ii) Kio estas "arto simpla kaj altnivela"?)

## III. Esencaj kontraŭdiraj demandoj de la beletra estetiko

a) Kio estas *la valoro* de la beletraĵo kiel estetika fenomeno? Kial kaj kiumaniere la estetika valoro progresas, stagnadas, regresas?

b) Ĉu la kritikistoj disponas pri objektivaj kriterioj por aprezi la valoron kaj progreson en estetika literaturo aŭ ĉu ili faras kriteriojn el propraj gustoj, kiel asertis *A. Thibaudet*?

c) Pri la metodologiaj eraroj de la skeptikaj tezoj;

d) Sociaj funkcioj de la beletro; estetikaj funkcioj de ĝiaj komponantoj;

e) Ĉu ekzistas principoj en la kreado de la beletraĵoj aŭ ĉu la poetoj vere kantas nur instinkte, kiel la birdo sur branĉo? Sekve: ĉu la estetiko havas praksiologian[2] signifon aŭ ĉu ĝi estas nur spekulado ĉirkaŭ la beletraĵo?

---

[1] *TUKYDIDES*: "Peloponeza milito", II, 40, 2 - 4

[2] Praksiologio - teorio, kreita de Pola filozofo *Jan KOTARBINSKI* - celas plifortigi la efikon de la homa agado

f) La beletro - precipe la prozo kaj la teatro - kiel homaj eksperimentoj sur abstrakta nivelo kaj sur artefaritaj modeloj;

g) Ĉu la lingvo - komuna aŭ beletra - havas estetikajn dimensiojn aŭ ĉu ĝi enhavas nur simbolojn, kiaj estas la matematikaj, ĥemiaj aŭ logikaj formuloj? Lingva esprimpoveco kaj ĝiaj fontoj;

h) Metodologiaj eraroj de la tezoj, kiuj neas *la belon* en la lingvo;

i) Kiun epistemologian rolon havas, por la beletra estetiko, la sugestoj de modernaj heŭristikaj perspektivoj, nome la sistemteorio, la modelteorio, la teorio pri strategiaj ludoj?

Marĝene de tiuj demandoj, ni diskutos *ne-ortodoksajn tezojn* kaj faros tion ne en kateĥisma formo de demando kaj respondo, sed laŭ ilia interna kunligiteco, ĉiam strebante al demonstracio. La grandaj antaŭuloj de la estetiko - ekde Aristotelo (384-322 a.K.) ĝis KANT (1724-1804), CROCE (1866-1952) kaj niaj samtempuloj - estos, por la debatoj, elirpunktoj por *tezo* aŭ *kontraŭ-tezo*, neniam senkondiĉa aŭtoritato. La demonstrado devas utiligi *ekster-estetikajn* perspektivojn, logikajn procedojn (t.e. analizo, sintezo, komparado, analogio, indukto, dedukto, redukto kaj aliaj) por eviti la kaptilojn de la intuicio kaj de la imanentaj perspektivoj. La kulturhistorio ofertas nur ekzemplojn ( por ĉiuj tezoj! ), ne argumentojn. La sciencoj, la kulturo igas pli fajna la homan pensadon. (*Didaktika orientiĝo:* i) La intuicio kiel nefilozofa konilo; ii) Kio estas "imanenta esplormetodo"?)

## IV. Funkciaj komponantoj de la beletra verko kaj abstrakta sistemo de la beletro

Por prezenti funkciajn komponantojn de la verko, ni bezonas la koncepton pri *sistemo*. Konceptoj kiel *sistemo, modelo* kaj aliaj havas plurajn sencojn: ekzistas po ĉirkaŭ 30 da ili.

En miaj konsideroj pri estetiko, sistemo estos komprenata kiel *komplekso da elementoj kunligitaj per nehazardaj interrilatoj.* La homa korpo, ekzemple, estas sistemo, kiun konsistigas organoj, kiuj ankaŭ estas sistemoj, konsistantaj el elementoj aŭ subsistemoj. Do, la sistemoj havas hierarkian strukturon, ekde la mikroskopaj partikloj ĝis la universa makrosistemo. Sistemeco estas unu el la ĝeneralaj trajtoj de la fenomenoj. Ĉiu verko, ĉiuj verkoj de unu aŭtoro, de unu epoko aŭ de la tuta homaro estas sistemoj, nome *konkretaj sistemoj* (ĉar ili estas objektoj). Ne tiaj sistemoj interesas por nia diskuto, sed la *internaj komponantoj* de la beletra verko, pli precize



: la komponantoj per kiuj la beletraĵoj plenumas esence siajn estetikajn funkciojn. Ili estas multaj. La historio de la beletro evidentigas kiel plej gravajn la jenajn:

a) La temo, do la eventoj, faktoj, sentoj pri kiuj skribas la aŭtoro (amo, milito, naturo kaj aliaj). Necesus repertuaro de la temoj renkonteblaj en la beletro. La temo montras la kapablon de la verkisto, penetri en la homajn rilatojn al la realo, malkovri signifajn aspektojn de la ĉirkaŭanta mondo kaj alporti ilin en la sferon de la aktualaj interesoj de la socio. (*Didaktika orientiĝo:* Ĉu la temo gravas aŭ indiferentas por la valoro de la verko? *Orientilo:* Ĉiu komponanto gravas por la funkcio de la tutaĵo.)

b) La ideo aŭ idearo, do tio, kion la aŭtoro asertas pri sia temo. Ĝi estas, unue, la mesaĝo de la verkisto.[3] La idearo emas al samtempeco kun la pensmaniero de la koncerna epoko - en filozofio, politiko, moralo kaj religio, ĉar tiuj ĉi "eksterestetikaj" perspektivoj ankaŭ apartenas al la aprecadkriterioj de la leganto. Tamen plej gravas la *poezia ideo* de la verko, tiu ne atendita, impresiga, antaŭe ne konata *solvo*, kiun la aŭtoro trovis por prezenti la enhavon. Ekz. ĉe DANTE : Vergilio kaj penetro en inferon; ĉe CERVANTES : Don Kiĥoto; ĉe GOETHE : La legenda personeco de d-ro Faŭsto. Tiun poezian ideon emfazis WARINGHIEN prezentante la verkon de ANDERSEN. La Rumana poeto kaj filozofo *Lucian* BLAGA avertis, ke pli gravas ne la filozofio kiun la poeto metas en sian poeziaĵon (diskursive), sed la filozofio kiun li havas kiel mensan trezoron.

c) La personoj, do la roluloj en epikaj aŭ dramaj verkoj. En liriko ekzistas nur la tiel nomata *lirika heroo*, kiu kutime estas la aŭtoro mem. Beletraj personoj kunligas la temojn kaj motivojn de la verko, esprimas la konceptojn -ĝustajn, falsajn, diskuteblajn- kiujn la aŭtoro volas emfazi. Kaj precipe, tiuj artefaritaj figuroj -samtempe realaj kaj nerealaj, sed havantaj spiritajn strukturojn izomorfajn al reala homo- senfine spertas travivaĵojn signifoplenajn por la leganto, kiu tiamaniere -sen la riskoj de la realaj

[3] La ideoj de la verkoj estas pli multaj ol tiuj, kiujn la aŭtoro volas aserti. Krom la mesaĝo (semantika informo), la beletraĵo komunikas ankaŭ ektosemantikan informon (tion, kion la aŭtoro senintence komunikas, kion ni legas "tra la vicoj" - same kiel pri silenta pasanto sur la strato ni povas diri ĉu li junas, maljunas, nigraharas k.t.p.) kaj strukturan informon (t.e. informo, ege grava por aliaj verkistoj, kritikistoj, estetikistoj: kiel la verko estis farita, strukturita por ke ĝi havu certan estetikan valoron).

spertoj- akiras sugestojn ne por imiti la beletraĵajn personojn, sed nur por *mediti* ties spertojn.

Gravaj romanoj, teatraĵoj kaj filmoj ebligas al ni eksperimentojn sur abstrakta nivelo. La pozitivaj, negativaj, kompleksaj personoj estas plastikaj imagoj de tio, kion ni ŝatas, malŝatas, komprenas aŭ miskomprenas en la vivo, kaj kio determinas destinojn - individuajn kaj kolektivajn.

d) La ago, la konfliktoj, intrigo, peripetioj, do la ĉeno da okazintaĵoj en iliaj epikaj aŭ dramatikaj sinsekvoj. Ĝi evidentigas la fabeladan kapablon de la aŭtoro, lian maturecon kiel pensanto kaj rakontisto. La ago povas esti poezia (tiaj estas multaj fragmentoj de la antikvaj epopeoj, ekz. *Gilgameŝo, Iliado*), enuiga aŭ interesega (tiun eblecon uzas kaj misuzas la detektivromano), longa en tiel nomataj *"riverromanoj"* ( = pluraj volumoj), aŭ mallonga en skizoj kaj noveloj. Komercaj produktaĵoj, ekz. filmoj en sennombraj epizodoj, ofte spekulas la naturan emon de la homo al rigardado de "kio okazas en la mondo". (*Didaktika orientiĝo:* Komparado kaj aprecado de la agaj kvalitoj en la esperantlingvaj romanoj de *H. VALIENNE* kaj *H.A. LUYKEN* laŭ la rerakontoj de *Vilmos BENCZIK* en "Libro de romanoj").

e) La arĥitektonika strukturado, la komponaĵo, t.e. la dimensioj kaj ordigoj de scenoj, ĉapitroj, la diversaj rakontaj, priskribaj, dialogaj, monologaj procedoj kaj teknikoj - komence de la malnovaj popolaj fabeloj ĝis la realismaj romanoj, ĝis la ideoasocia tekniko de *M. PROUST* kaj ĝis la teknikoj de *JOYCE, Umberto ECO* kaj aliaj. Tiu ĉi komponanto, kiu en tradicia estetiko apartenas al la formo de la verko (same kiel la lingvo kaj verso), funkcias optimume kiam ĝi estas travidebla, permesante la alireblecon al la enhavo. Strangaĵoj (versoj kies aranĝoj sur la paĝo volas imiti la fumon de la cigaredo k.t.p.) ne donas modernecon. La Latina vorto por belo estas *formosus,* derivaĵo de "formo", kaj unu difino de "la belo" estas: plena kongruo de la formo de objekto al ties celoj.

f) La lingvo kaj stilo, do fonetiko, gramatiko, leksiko, stilistiko kun iliaj eblecoj ege variaj kaj multnombraj, kun stilfiguroj kaj retorikaj procedoj. La unua signo pri beletra talento de estonta verkisto estas la "lingva sento", la "intereso pri la vortoj", pri ilia esprimpoveco. La lingvo estas la "materialo" de la beletro, kaj la kvalitoj de tiu materialo ege gravas por la verko - tamen kelkaj valoraj verkistoj lingve ne elstaras, ĉar ili ne sufiĉe zorgis pri ĝi aŭ verkis en lingvo nur *studata,* ne patrina.



La grandaj kulturkreantoj atente serĉis la belecojn de la lingvoj en kiuj ili skribis. Tie ĉi, en Prago, mi deziras mencii, ke en 1495 *Kornel ze Vysegrad* laŭdis la belecon de la Ĉeĥa lingvo kaj substrekis ĝian kapablon esprimi, same kiel la klasikaj lingvoj, la plej fajnajn nuancojn de la intelekto kaj afekcio.

g) En poeziaĵoj aperas la *verso* - kun ritmoj, paŭzoj, rimoj kaj strofoj. Grandaj poetoj estis ankaŭ majstroj en versfarado, bonege konis ties postulojn, evitis ŝablonojn, facilajn solvojn (kiaj estas la *adasismo,* t.e. facila rimado per *"-adas"* en la Esperantaj poeziaĵoj). La moderna poezio pli atentas la enhavon kaj la internan ritmon, ol la klasikeco de la versstrukturo, tial la verso iĝis *blanka* (sen rimo) kaj *libera* (sen klasikaj ritmoj). Ĉiukaze, la verso estas "la purpura kaj ora vestaĵo de la beletra teksto", tute ne simple prozo skribita en neegalaj vicoj. (*Diskuttemo en AIS-seminario:* Klasikaj kaj modernaj versoj.)

Do, la funkcianta esenca sistemo de la beletraĵo konsistas el: TEMOJ, IDEOJ, PERSONOJ, AGOJ, STRUKTUROJ, LINGVOJ, VERSOJ. Tiuj ĉi *komponantoj,* apartenantaj al ĉiu beletraĵoj, estas nur penseblaj - ne "videblaj": ili do konsistigas *abstraktan sistemon* de la beletro. Ĝia praktika graveco estas, ke la verkistoj konscias pri la komponantoj kaj pri iliaj funkcioj (nur parte menciitaj supre), do pri iliaj postuloj, kaj tiel estas pli facile por la aŭtoroj, potencigi la funkciojn kaj la interrilatojn cele de supera sinergia efiko. La beletro entute postulas *plurfakan kvalifikiĝon* de la verkisto, ĉar li estas dirigento de vasta orkestro, pli precize de hierarkio de orkestroj; la idealo de *poeta doctus* (Latine: "alte kulturita poeto") ĉiam validas. Aŭtoro sen kulturo skribas rudimentan beletraĵon.

V. Abstraktaj modeloj en la beletra fenomeno

En diversaj epokoj, ĉe diversaj aŭtoroj, eĉ en apartaj verkoj de la sama aŭtoro, la menciitaj komponantoj de la abstrakta sistemo prenas specifajn karakterojn. Ekzemple en la antikva beletro la ĉefaj temoj estis mitoj, interhomaj konfliktoj, impresemaj peripetioj, amo kaj aliaj, sed ne la naturo, la laboro (tio ja estis afero de la sklavoj - kvankam la poemo "Laboroj kaj tagoj" de Hesiodo tuŝas la temon), la tuthomeco, kvankam Diogeno (413 -

323 a. K.) deklaris sin "mondcivitano" - sed, laŭ la Helenoj, la alilingvanoj kutime estis *"varvaros"*, t.e. barbaroj, balbutantoj.[4]

La tiama ĉefa ideo estis la ĉiopovoco de la destino; la personoj devis esti altrangaj, karaktere elstaraj, strukture unuecaj kaj konsekvencaj, la komponaĵo imitis la strukturon de realaj eventoj, la agado devis respekti la tiel nomatan "regulon de la tri unuecoj", nome unueco de spaco, de tempo kaj de ago. La lingvo devis esti alirebla, komuna sed ne triviala, la versoj havis certajn ritmojn kaj mezurojn. Do, la ĝenerala, abstrakta sistemo de la beletro devis respekti specifajn postulojn de tiu epoko: tiuj postuloj konsistigis la *abstraktan modelon* de la Helena beletro, ties invariantojn[5].

Tiu antikva modelo grandparte (sed neniam entute) ŝanĝiĝis dum la mezepoko, dum la renesanco, klasikismo, romantismo, moderno. Ankaŭ la diverse orientitaj beletraj skoloj kaj la diversaj naciaj kulturoj havas iom specifan modelon pri tio "kio estas vera beletraĵo": la Japana poezio ne havas la saman abstraktan modelon pri la poezio kiel la Eŭropa poezio. La moderna tekniko, studinte la abstraktan modelon de iu forpasinta pentristo, poeto aŭ skulptisto, sukcesas daŭrigi iliajn nefinitajn verkojn. Mi insistis pri la *abstrakteco* de nia bezonata koncepto pri *modelo,* por ke oni ne miskomprenu tiun ĉi vorton, ĉar en nefaka lingvo ĝi signifas "imitindan ekzemplon". Ne pri tio temas. En la beletro ĉio povas esti pripensinda, sed *nenio imitenda.* Kiam la literaturhistorio prezentas la trajtojn de iuj skoloj aŭ de verkaroj de diversaj aŭtoroj, fakte ĝi prezentas ties abstraktajn modelojn.

La koncepto pri la abstraktaj modeloj de la epokoj aŭ verkistoj, do la perceptado de la verkaj invariantoj (kiuj, vidate, iom varieblas) havas gravan metodologian signifon en la studado de la estetikaj valoroj kaj de ties progreso, stagnado kaj regreso, ĉar oni devas kompari ne "ĝenerale" la

[4] La temo *tuthomeco* oftas en Esperanta poeziaĵo (*BAGY, AULD, BOULTON* kaj multaj aliaj) kaj jam per tio montriĝas la moderneco de nia kulturo, ĉar la ideo mem de la *homara unueco* estas nova : eĉ nia generacio ĝin ne tute komprenas kaj alproprigas.

[5] Por pli facile kompreni la koncepton pri abstrakta modelo, bv. rimarki ke la infanoj, komencante paroli, ne povas fari propoziciojn el ĉiuj substantivoj kaj verboj antaŭ ol kompreni la *abstraktan modelon de la propozicio;* ili uzas nur stereotipajn propoziciojn ("paĉjo venas", "jen lampo"). La ŝuisto bezonas unue "abstraktan modelon" de ŝuo k.t.p.



personecojn aŭ majstroverkojn[6] (ankaŭ por konstati la sciencan progreson oni ne komparas sciencistojn -*Newton al Einstein*) sed la abstraktajn modelojn, sur kiuj baziĝas la kreitaĵoj. *Majstroverko estas nur alttalenta beletra atingaĵo sur la modelo, kiu karakterizas certan epokon aŭ skolon (kelkfoje nur aŭtoron).* Tio estas modelteoria koncepto pri la majstroverko. Per siaj talento, kulturo kaj vivospertoj, la verkisto donas "karnon" al sia koncepto pri la arta verko, do al sia abstrakta modelo pri "kio estas verko".

VI. Funkcioj de la beletro; valoro de la beletraĵo

En sistemteoria perspektivo, valoro[7] estas la kapablo de iu ajn cele orientita aŭ orientebla sistemo altnivele plenumi la funkciojn al si specifajn. Ankaŭ la homo estas valora se li supere plenumas la postulojn de la ĉirkaŭanta medio. Sekve, por konstati la valoron necesas rilatigi objektivajn ecojn de la fenomeno al postuloj de la *aprecanta homo* (Latine: *homo aestimans*). Aprecante la valoron de la verkoj, ni unue devas analizi la hodiaŭan validecon de la abstrakta modelo sur kiu baziĝis siatempe la verko, kaj due la solvojn, kiujn la aŭtoro donis al diversaj artaj problemoj de la beletra strukturo. Per tiuj du aspektoj *Hamleto* kaj ĉiu ajn alia ĉefverko ricevis specifecon. Tio signifas, ke ĉefverko estas beletraĵo kies interna modelo (ankoraŭ) validas, kaj la plej multaj aŭ almenaŭ la plej gravaj komponantoj kaj siaj interrilatoj ricevis altnivelajn solvojn. Tio estas la aksiologia difino de la majstroverko (aksiologio estas teorio pri la valoroj). Diference de la supre menciitaj difinoj de la valoro, tiu ĉi koncepto havas praksiologian signifon. (*Diskuttemo en AIS-seminario:* Ĉu la majstroverkoj estas "eternaj"? *Orientiloj:* i) La naturo konas neniun funkcion por senmortaj fenomenoj; ii) Se la valoro estas rilato inter objekto kaj subjekto, ĝi ŝanĝiĝas, se la penso, mentaleco, afekcio de la homoj ŝanĝiĝas, iii) La epopeo *Eneido* de *VERGILIUS* estis plurfoje en la historio - ĉu ŝatata, ĉu malŝatata; la francaj klasikuloj tute ne ŝatis la verkojn de *SHAKESPEARE.*) Konklude, por

[6] La beletraj verkoj estas ege kompleksaj, oni ne povas intuicie tuj percepti la elementojn, la artajn solvojn kaj valorojn: dum ĉiu scienco studas nur apartan sferon de la realo, la beletro entenas samtempe plurajn, principe "ĉiujn" fenomenojn, realajn aŭ nerealajn, fantaziaĵojn, utopiojn eblajn aŭ neniam eblajn; do, la beletro sekvas fidele la aventurojn de la homa konscienco.

[7] La tradicia estetiko difinas valoron ĉu vage (*"ĝi estas esprimo de la belo"*), ĉu taŭtologie (*"estetika valoro estas la valoro de la artaj verkoj"*) aŭ, agnostike, oni deklaris ĝin "ion nepriskribeblan", "ion nedifineblan" (France: *ineffable*).

konstati la valoron de la beletraĵo, oni devas rilatigi la verkon al la sociaj funkcioj de la beletro. Sed kiuj estas tiuj funkcioj? Pri tiu ĉi esenca demando la estetikistoj ne samopinias, kaj certagrade tio favoras la variecon de la beletro. Tamen, neniu estetika teorio povas pretendi pli aŭ malpli da rigoreco, se ĝi estas nur spekulado ĉirkaŭ la beletra fenomeno, sed engaĝiĝas por neniu celo, kvazaŭ montrante "Mekon en ĉiujn direktojn".

La unua paŝo de la verkisto al la valoro de la skribota verko estas *alta koncepto pri la sociaj funkcioj de la beletro.* Tiuj funkcioj estas multegaj, sed ne samvalidaj. La literaturhistorio, post preskaŭ trimiljaraj spertoj, atestas pri la valideco kaj "senmorteco" de tiaj verkoj, kiuj "simple kaj altnivele" estas kunligitaj kun la raciaj tendencoj, aspiroj, idealoj de la homa konscienco - iom ŝanĝita dum epokoj, kaj tamen konservante esencajn invariantojn. Mallonge oni nomas tiun malnovan kaj aktualan orientiĝon: delekta, formiga, katarsisa[8].

Esence, la grandaj verkoj plibonigas niajn animostaton, kreivajn kapablojn, apogas niajn meditemon, fantazion, la rilatojn kun la medio. La grandaj aŭtoroj estas "konsciencoj de siaj epokoj", forta voĉo, kiu efike povas moki, ridi, plori kaj reagi kontraŭ la malbono, malpravo, malhomeco, konsoli, voki al agado kaj ili faras ĉion tion per rimedoj "pli daŭraj ol la bronzo", kiel diris la antikva *Horatius* (65 - 8 a. K.).

Sekve, la verkisto priatentu, kion li faras per sia talento. Laŭ praksiologia principo dependas la grandeco de rezulto ne nur de la aplikotaj fortoj, sed ankaŭ de la sfero kaj direkto en kiuj la fortoj estas aplikotaj. La talento en si mem ne povas reteni la aŭtoron, pentri anĝelojn kaj denove anĝelojn. La literaturhistorio konas verkistojn, kiuj, spite al siaj talentoj, ne postlasis gravajn verkojn, ĉar ili agadis en nevalidan direkton.

Adreso de la aŭtoro
*OProf. Ignat Florian BOCIORT*
*Bd. Eroilor nr. 7/D,*
*RO - 1900 Timişoara,* Rumanio

[8] Aristotela koncepto, signifanta proksimume "purigadon de animo"

*Scienca Revuo 48 (1997) 29 - 33*

# Tersciencoj -- ĉu krizo aŭ novaj perspektivoj? *

*DUDICH Endre (HU)*

Enkonduko

Oni ofte sonigas alarmon, je nacia, regiona kaj eĉ tutmonda skalo. Baldaŭ elĉerpiĝos la erckuŝejoj! Post kelkaj jar(dek)oj finiĝos la rezervoj de petrolo kaj tergasoj! La defalaĵoj, rubaĵoj k.t.p. katastrofe malpurigos la homan vivmedion! Varmiĝas la klimato, kiu ekhavos katastrofajn sekvojn! Facile estas por ĉiuspecaj demagogoj kulpigi la sciencon. Ankoraŭ pli facile estas akuzi la sciencistojn. Mia konvinko estas, ke la scienco estas senkulpa. Eĉ krom tio, ke ne estante persono ĝi povas esti nek kulpa nek senkulpa. La malkovroj kaj inventoj faritaj dum nia jarcento estas kapturnige multaj, variaj kaj parte vere grandiozaj. Mi vidas nenian naturan kaŭzon, kiu haltigus aŭ konsiderinde bremsus tiun progreson.

"La" sciencistojn akuzi ne havas sencon. Inter ili ja troviĝas ĉiuspecaj homoj. Bedaŭrinde ankaŭ tiaj, kiuj utiligas siajn konojn kaj malkovrojn ne etike, eĉ malmorale, por malbonaj celoj, aŭ permesas al aliuloj fari tion. Tiajn kazojn oni devus studi kaj prijuĝi po unu, evitante maljustan ĝeneraligon.

Ne la scienco ĝenerale, kaj la tersciencoj speciale, estas en krizo, sed nia socio, nia vivmaniero kaj konduto. Temas pri la industribazita Eŭropotipa socio; sed pro ekonomiaj kaj politikaj kialoj tiu koncernas praktike ĉiujn ceterajn komunumojn de la homaro. Pro tio organizaĵoj de la tersciencoj (geologio, geofiziko, geokemio, geografio ktp.) fakte troviĝas en krizo. Mi havis bonan eblecon konstati tion dum la ses jaroj kiam mi estis sekretario de la IGCP (Internacia Programo pri Geologia Korelacio) en Parizo de 1986

-----------------------

* Omaĝe al profesoro *STOP-BOWITZ*, la plej(e) esperanta, senhezite optimisma natursciencisto